Heinrich Neye,

# Malnovaj hejm-rimedoj

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Jarcento nia - oni diras,
ke temp' de laco estas ĝi,
malmulte mi pri tio miras,
ĉar laca estas ankaŭ mi.

Fratinoj, ankaŭ fratoj miaj,
plej multaj, kiujn konas mi,
pro siaj ŝarĝoj profesiaj
fariĝas lacaj pli kaj pli.

Mi malakordon tie vidas,
abisme ja aperas ĝi:
Teknik-progreso pli rapidas
ol hom' sur tiu Tero ĉi.

La kor', de kafo akcelite,
tag-nokte daŭre batas ĝi,
de l' tempo-premo plu pelite
sur la viv-vojo hastas ni.

Multegaj ja nuntempe estas
rimedoj kontraŭ la lacec',
sed la plej bonaj ĉiam restas
la dormo kaj la dikhaŭtec'.

*Traduko de la Germana poemo "Alte Hausmittel" de* HEINRICH NEYE *(∗1913-02-27 – †2002-07-18) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

*Arg-104-210 (2014-04-16 11:22:22)*

*Verkita estas la poemo de s-ro Henriko Najo (Heinrich Neye, 27.02.1913 – Juli 2002), Esperantigis ĝin: Manfredo Ratislavo (Manfred Retzlaff, *04.11.1938) en 2006-03-04 laŭ la origina germanalingva teksto. La germanalingva teksto de tiu ĉi poemo aperis en 1994 en la germana agronomia gazeto „Landwirtschaftliches Wochenblatt“ (Agronomia Semajnfolio).*